

La evoluo de la pensado de Zamenhof pri religioj kaj la rolo de lingvoj

Christer Kiselman

Enhavo:

1. Enkonduko
 2. Lingva fono
 3. Alvoko al la juda intelektularo
 4. La hilelismo de 1901
 5. Leteroj de Zamenhof antaŭ la Bulonja kongreso
 6. Leteroj de Zamenhof post la Bulonja kongreso
 7. La hilelismo kaj homaranismo de 1906
 8. Zamenhof obeas al la kritikantoj
 9. Planata kongreso pri neŭtrale-homa religio kaj la teksto de 1913
 10. La reviziita teksto de 1917
 11. Konkludoj
 12. Pli persona konkludo
- Bibliografio

Resumo. Surbaze de leteroj de Zamenhof kaj aliaj dokumentoj ni sekvas la evoluon de liaj pensoj pri hilelismo, homaranismo kaj neŭtrale-homa religio. Ni provas prilumi kiel la projekto de homaranismo kreskis el liaj unuaj klopodoj savi la judan popolon el ĝia malfeliĉega stato, kaj kiel liaj ideoj pri la rolo de lingvoj ŝanĝiĝis dum lia vivo. Temas pri tri malsamaj roloj de eblaj lingvoj: diserva lingvo (en lia kazo la hebrea kaj la aramea); instrua lingvo (la rusa); kaj lingvo por interkompreniĝo kun samsuferanoj alilandaj (en lia kazo mankanta). Al tiuj ĉi aldonendas la ĉiutaga lingvo, ne necese egala al unu el la tri menciitaj (por la plimulto de la judoj en orienta Eŭropo tiu ĉi estis la jida). Ni esploras kiel li volis krei novajn lingvojn por tiuj funkcioj kaj trovas paradokson pri lia sinteno al lingvoj: lingvo estas gravega por la difino de ĉiu popolo, sed samtempe tiom malgrava ke oni povas enkonduki novan, senhistorian. Li komprenis la ajnecon de kulturaj esprimoj kaj religiaj kutimoj pli bone ol aliaj – jen ebla klarigo pri la manko de sekvantoj.

Abstract. On the basis of letters written by Zamenhof and other documents we follow the development of his thoughts on Hilelismo, Homaranismo, and a Neutral All-Human Religion. We try to illustrate how the project of Homaranismo grew out of his efforts to save the Jewish people from its miserable state, and how his ideas on the role of languages changed during his lifetime. There are three very different roles of possible languages: as a language for divine service (in his case Hebrew and Aramaic); as a language of instruction (in his case Russian); and as a language for mutual understanding between suffering human beings in other countries (in his case missing). To these we must add a fourth, the language for everyday use, not necessarily one of the three mentioned (for most Jews in eastern Europe it was Yiddish). We investigate how he wanted to create new languages for these functions, and find a paradox in his attitude vis-à-vis languages: a language is crucial as a defining element of a people, but at the same time so unimportant that one can introduce a new one, without history. He understood the arbitrariness of cultural expressions and religious customs better than others—maybe this can partly explain the lack of adherents.

1. Enkonduko

Kial homoj lernas kaj uzas esperanton? Se oni trovas tiun demandon interesa, estas kompreneble pli interese kompreni kial Zamenhof ne nur lernis, sed kreis esperanton.¹

Se oni povas demandi sin kial homoj investas centojn da horoj por lerni esperanton, oni ja kun eĉ pli granda rajto povas demandi kial Zamenhof investis sian tutan vivon en tiu afero. Kompreneble ni neniam ĉiom komprenos. Sed estas tamen interese cerbumi pri tio kaj provi kompreni.

Zamenhof mem nenion publikigis por klarigi al ni siajn plej privatajn motivojn: tion ni povas ekscii nur el liaj leteroj – kaj certe nur parte. Krome, la klarigoj kiujn li formulas varias laŭ la adresato (kiel ĉe ĉiu sperta komunikisto): la motivoj menciataj en la ruslingva letero 1895 al Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko (tradukita esperanten de Vladimir Gernet, 1948a:343–350) ne estas la samaj kiel en lia letero 1905-02-21 al Alfred Michaux (1948a:105–115).

Tamen oni ne povas fari tion kion li faris sen ege grandaj internaj fortoj pelaj. En la unua libro de 1887 ja enestas motivoj, sed tiuj estas motivoj kiujn li volas prezenti al la publiko por ke “dek milion,o,j person,o,j” promesu “el,lern,i la propon,it,a,n de d-r,o Esperanto lingv,o,n inter,naci,a,n” (Дръ Эсперанто 1887:31, 33, zamenhof 1989:107, 109), ne la motivoj kiujn li mem havis, kaj mi diras tion bone sciante ke tiaj motivoj eble tute ne povas esti eksplice esprimitaj. Ja multo kion ni mem faras en la vivo ne havas eksplican motivon; ni mem ne komprenas, kaj eĉ se ni komprenas iom, ni ne mem povas klare formuli kaj eĉ malpli povas fidi ke iu formulado estas kompleta. Ni tamen do provu cerbumi.

La plej grava ideo de Zamenhof estis la unuigo – aŭ unuigo – de la tuta homaro. Esperanto estis nur la lingva flanko de tiu ideo. La alia flanko estis filozofia kaj religia. Sed la ideo pri unuigo de la homaro ne aperis tute preta en la komenco: ĝi kreskis el alia projekto, nome la savo de la juda popolo (tiam nomata hebrea pro influo de la rusa lingvo).

La plej gravaj dokumentoj sur kiuj mi bazos tiun ĉi tekston estas manuskripto verkita verŝajne en 1901, libroj verkitaj en 1901 kaj 1906, artikolo el 1906, la Deklaracio pri Homaranismo de 1913 kaj de 1917, kaj multaj leteroj. La unuaj prezentas liajn argumentojn per kiuj li volas influ la mondon. Por la kompreno tre gravas liaj leteroj. El ili ni povas iom vidi lian strategion por atingi la celon kaj kelkfoje lian personan pensadon kaj turmentigadon. Mian prezenton gvidos tre simpla principo: mi sekvos laŭtempe la skribaĵojn kaj leterojn de Zamenhof. Tio havas la avantaĝon ke eblas sekvi la evoluon de lia pensado. En la sekcio 2 mi skizas la lingvan fonon.

Mi devas fari bedaŭran rezervon. Mi studis la verkojn de Zamenhof, sed mi ne studis la ĝeneralan pensadon pri religio de lia tempo. Estus interesa temo studi kiel lia pensado kongruas – aŭ eble malkongruas – kun la tiutempa ĝenerala strebado filozofia kaj religia.

¹Mi intence diras ke li kreis esperanton, ne ke li “iniciatis” ĝin. Ni notu ke la Bulonja Deklaracio parolas pri la “kreinto de Esperanto” (Zamenhof 1991:37). Eble estas juste diri ke li kreis la lingvon kiel gramatikan kaj semantikan sistemon kaj iniciatis ĝin kiel socian realaĵon, ĉar portas ĝin la esperantoparolantoj.

Teksto de Michel Clément (2009) prezentas la homaranismon kaj opiniojn pri ĝi de pluraj aŭtoroj kaj iom sekvas la postan evoluon de tiu doktrino spirita, religio aŭ utopio humanisma.

Kiel loki Zamenhof inter la pensuloj de la mondo? Laŭ Dovid Katz la litvako (judaj litvanoj) havis inter aliaj judoj en tiu parto de Eŭropo tre specialan reputacion: ili estis konsiderataj kiel pli kleraj ol aliaj kaj okupataj per la esplorado de pli-malpli ĉio. Krome litvako estis konsiderata kiel tre obstina kaj decidema ĝisfunde konatiĝi kun aferoj (Katz 2009:47). Koncede tio ja estas folkloro, kaj folkloro ne prezentas iun ekzaktan veron, sed, kiel konstatas Katz (2009:48), ĝi enhavas ion tiklan, iujn erojn de la vero. Kaj li priskribas plurajn klerulojn litvakajn kiel *mavericks*. (La uson-devena vorto *maverick* signifas origine ‘neardstampita bovido’, sed en tiu kunteksto proksimume ‘sendependulo, liberpensulo’.) Kaj laŭ Katz Zamenhof estis “Perhaps the last of the true Litvak mavericks” (Katz 2009:52); eble la lasta el la veraj sendependuloj litvakaj. Tio estas verŝajne la plej ekzakta priskribo de lia kultura fono. Sed lia pensado certe meritas komparon en pluraj aliaj kadroj: li estis ne nur bjalistokano, varsoviano kaj litvako, sed ankaŭ eŭropa intelektulo.

2. Lingva fono

Árpád Rátkai (2009) verkis tre interesan artikolon pri la traktado dum jarcento de la nomoj kaj plumnomoj de Zamenhof. Tamen laŭ mi Rátkai iom tro emfazas la nomojn oficiale registritajn de la rusia administracio. Interalie, la oficiala registrado de nomoj ne estis tre fidinda, kiel montras ekzemple Zbigniew Romaniuk en sia artikolo ĉi-volume, kie aperas dek malsamaj formoj de la familia nomo Zamenhof dum la periodo 1837–1897 (vidu la tabelon sur paĝo 34). Pli grave: ni devas kompreni ke Zamenhof vivis en vere plurkultura ĉirkaŭaĵo, kie la rusa kulturo kaj la rusia administracio estis nur unu elemento. La jidparolanta kulturo estis alia, grava kaj multflanka, kvankam neniam kaj nenie ŝtatkonstrua. La hebrea lingvo kaj la aramea lingvo estis gravaj religie kaj ceremonie, kvankam ne parolataj por ĉiutagaj aferoj. Do, jam tie kvar lingvoj kaj tri kulturaj sferoj renkontiĝis en la menso de la juna Zamenhof. Estis ekzemple tute kutima afero havi individuajn nomojn variantajn laŭ la lingvo: Mordĥe, Motl, Mark, Marko.

Ĉar nur unu el tiuj lingvoj kaj kulturoj havis la apogon de ŝtata adminstracio, estas tiu ĉi kiu lasis spurojn en la arkivoj, sed la aliaj, do la ĉiutaga jida kaj la ceremoniaj hebrea kaj aramea, ne estis malpli realaj.

Dum la rusa estis la lingvo de la ŝtata administracio kaj la supera edukado en la imperio, tri aliaj lingvoj, la hebrea, la jida kaj esperanto, estis aparte aktualaj por la judoj en Eŭropo dum la dua duono de la deknaŭa jarcento.

La rusa lingvo

Plej multe mi amis tiun lingvon, en kiu mi estis edukata, t.e. la lingvon rusan; mi lernadis ĝin kun plej granda plezuro; mi revis iam fariĝi granda rusa poeto [...]

En mia infaneco mi amis tre pasie la lingvon rusan kaj la tutan rusan regnon; sed baldaŭ mi konvinkiĝis, ke mian amon oni pagas per malamo, ke ekskluzivaj mastroj de tiu lingvo kaj lando nomas sin homoj, kiuj vidas en mi nur *senrajtan fremdulon* (malgraŭ

ke mi kaj miaj avoj kaj praavoj naskiĝis kaj laboris en tiu ĉi lando), ĉiuj malamas, malestimas kaj premeegas miajn fratojn [...] (Letero 1905-02-21 al Alfred Michaux; Zamenhof 1948a:110–111)

Nenio aldonendas.

La hebrea lingvo

En centra kaj orienta Eŭropo la hebrea lingvo estis ĉefe uzata, kune kun la aramea, kiel diserva lingvo. Estiĝis movado por fari ĝin pli uzata, kaj pli uzebla (vidu Fellman 1973 kaj Harshav 1999a).

Lejzer (Eliezer) Perlman, alinome Eliezer Ben-Jehuda (1858–1922) estis pioniro kaj simbolo de la reveno al la hebrea lingvo. En 1879 li publikigis hebrelingvan artikolon en la monata revuo *Hašahar* ‘La tagiĝo’ kaj tie prezentis la ideon de revivigo de la antikva hebrea lingvo kiel ĉiutage parolata lingvo. Li devigis sian edzinon Dvora Jonas, Dvora Ben-Jehuda, paroli nur la hebrean post kiam ili estis alvenintaj al Israelo en 1881. Ŝi estis la unua hebrepapolanta patrino dum multaj jaroj, kaj ilia filo estis la unua infano kiu parolis la hebrean dum multaj jaroj.

Ideologia faktoro estis laŭ Shelomo Morag (1993:213) pli grava ol aliaj faktoroj en la reveno al la hebrea: la urĝo disrompi la ligojn al la Malnova Mondo, disrompi la ligojn al la *štetl* de centra kaj orienta Eŭropo, disrompi la ligojn al la *galut* ‘diasporo’.

La jida lingvo

La jida lingvo estis la ĉiutage parolata lingvo de la granda plimulto de la judoj en centra kaj orienta Eŭropo. La eldiroj de Zamenhof pri ĝi estas iom kontraŭdiraj.

En sia broŝuro *Hilelismo* li skribis 1901:

La leganto ne pensu, ke ni apartenas al la malamikoj de ĵargono. Kontraŭe: dum nia intelektularo preskaŭ senescepte (ne esceptante eĉ ĵargonajn verkistojn) rilatas al ĵargono kun la plej granda malrespekto kaj konsideras ĝin iom sovaĝa, ni ĉiam rilatis kaj rilatas al ĝi eĉ nun ame kaj ni vidas en tiu ĉi tiel nomata ĵargono kaj tian saman lingvon, kiel ĉiujn aliajn lingvojn. Antaŭ 20–25 jaroj ni fervore kaj pasie dum longa tempo laboris super tiu ĉi lingvo, kaj tiam ni konvinkiĝis, ke ĝi ne nur havas riĉecon de formoj, sed havas la plej konsekvencajn kaj rigorajn gramatikojn,² en multaj rilatoj originalajn kaj rimarkindajn. Tiun ĉi gramatikon ni sisteme prilaboris kaj ni estis jam pretaj publikigi ĝin, revante pri fondo de pura kaj civilizita nov-hebrea literaturo anstataŭ nuna erara kaj kripla. Sed poste ni venis al konkludo, ke tio ĉi estus afero sen iu celo kaj estonteco, ke, prezentante per si mem pure lokan kaj provizoran dialekton, ĵargono havas nenian rilaton al hebreeco kaj ke per ĝia kulturado ni alportus al hebreeco nenian komplezon. (Zamenhof 1972:10–11; traduko el la rusa fare de Adolf Holzhaus)

Kiel li mem konstatis, la jida havis malaltan statuson. Ĝi estis tro malforta laŭ Zamenhof (vidu citaĵon sur la paĝo 44). Li kutime nomis ĝin ne lingvo sed “ĵargono”³ (1982: 9; 1982:125, 1990:1083, 1084; 1972:58, 1990:1184, 2006:81; 1972:109, 1990:1440, 2006:

²En la rusa originalo “самую стройную и строгую грамматику”; стройный signifas kaj ‘konsekvenca’ kaj ‘harmonia’.

³Laŭ Tsvi Sadan la termino *ĵargono* “estis kvazaŭ propra nomo por la jida” (persona informo 2009-11-05).

101) aŭ “dialekto”: “la lingvo de mia gento estas hebrea-germana dialekto, lingvo de mia gepatra domo estis la lingvo rusa” (poŝtkarto 1906-02-28 al Teodor Ĉejka (1878–1957), 1990:1694) aŭ malrekte referencas al ĝi kiel “dialekto” (1948a:201, 1990:1597, 2006:117; 1948a:201, 1990:1601–1602, 2006:120; 1983:319, 1990:1680, 2006:133).

Li skribis: “mi libere *parolas* nur en tri lingvoj (ruse, pole kaj germane)” (Letero al Alfred Michaux 1905-02-21; Zamenhof 1948a:111). Li do ne mencias la jidan ĉi tie; ĉu pro tio ke li ne kalkulis ĝin inter la lingvoj aŭ ĉu pro tio ke li ne parolis ĝin libere en 1905?

Li skribis en la sama letero ke la jida havas nenian gramatikon:

Ĉar la pli granda parto de nia popolo (precipe en Rusujo) ne uzas la lokajn lingvojn, sed parolas per aparta ‘ĵargono’ hebrea-germana (la tiel nomata ‘yiddisch’), kiu ĝis nun ankoraŭ posedas nenian gramatikon, tial mi antaŭ longa tempo dediĉis ĉirkaŭ 2 jarojn al la fundamenta esplorado de tiu ĵargono, mi esploris ĉiujn ĝiajn leĝojn kaj mi ellaboris ĝian gramatikon (kiun mi tamen neniam publikigis). Poste mi tamen forĵetis tiun ĉi laboradon, ĉar mi opiniis, ke la vekado de la kvazaŭ-nacia patriotismo ĉe la hebreoj povus esti malutila por ili mem kaj por la ideo de la unuiĝo de la homaro. (Letero 1905-02-21 al Michaux; 1948a:109, 1990:1440, 2006:101–102)

La jidan gramatikon publikigis Adolf Holzhaus (Zamenhof 1982); por pli da informoj pri ĝi vidu Holzhaus (1969:22–34), Cherpillod (1997:15–16) kaj Kiselman (2008:43–45). Estas notinde ke Zamenhof studis la jidan ne nur pro interesiĝo pri la lingvo; lia gramatiko estas almenaŭ certgrade normiga, ĉar li volis altigi la statuson de la ĵargono al vera lingvo. Li volis doni al la judoj pli da memfido pere de tiu normigo kaj la sekva altigo de prestiĝo. Li estis lingvisto por influi la mondon!

En 1901 la jida do – kvankam foje “erara kaj kripla” – laŭ li estis samranga kun ĉiuj aliaj lingvoj kaj havis “plej konsekvencajn kaj rigorajn gramatikon”, sed en 1905 ĝi havis “nenian gramatikon”.⁴ Zamenhof verkis jidan gramatikon en la rusa, laŭ li mem dum ĉirkaŭ du jaroj; verŝajne dum la periodo 1879–1882 aŭ eĉ pli frue; se ni kalkulas 20–25 jarojn antaŭ 1901, ni alvenas al la jaroj 1876–1881.

La citaĵoj nature kondukas al la demando kiomgrade la ruslingva gramatiko pri la jida (Zamenhof 1982) estas priskriba kaj kiomgrade ĝi estas preskriba, normiga – tio estus interesa esplorprojekto.

Ĉiukaze, estas klare ke la jida estis por li tre amata lingvo; li rilatis al ĝi “ame” kaj laboris pri ĝi “fervore” kaj “pasie”; li skribis: “thirty years ago, when I worked with the Yiddish language with hot love” (citita laŭ Gold 1980:305–306; la citaĵo estas traduko el jidlingva artikolo publikigita en 1910).

Claude Piron (1985) donas plej kredindan priskribon pri la situacio de Zamenhof rilate al la jida, pri liaj konoj kaj pri lia jidparolanta ĉirkaŭaĵo.

Estiĝis movado por altigi la statuson de la jida lingvo (vidu Goldsmith 2000 kaj Harshav 1999b). Matisjohu Mieses (1885–1945) donis kiel la unua scienca prelegon pri la jida lingvo en la jida en konferenco en Cernovtsy (Ĉernivci, Chernowitz, Cernauti; en Bukovina, nun en Ukrainio), en 1908.

⁴Ĉi tie povas ludi rolon la signifo de la termino *gramatiko*. Aŭ ĝi signifas la (eble ne eksplice konatajn) regulojn kiuj necesas por paroli lingvon; aŭ libron kiu klarigas tiujn regulojn. Tiel la ŝajna kontraŭdiro dissolviĝas.

Ber Boroĥov (1881–1917) kreis la sciencan kampon de jida filologio. Grava libro lia estis publikigita en Vilno en 1913.

Pri la influo de la jida lingvo sur esperanton vidu Kiselman (1992), Cherpillod (1997:16–18) kaj Kiselman (2008:49–53).

Praesperanto, esperanto

Kiel ni scias Zamenhof verkis jam en 1878 poemon en lingvo nomata *Lingwe uniwersala: Jam temp' está!*

En 1881 iu praesperanto estis sufiĉe preta: *Il kalaj guroj la ŝemmo rajiŝé alia prekalo ol di no* ‘En-la varmaj landoj la suno radias alian varmegon ol ĉe ni’.

Post kelkaj ŝanĝoj en tiu praesperanto aperis la *Unua Libro* en 1887; firman bazon li publikigis en la *Fundamento* 1905.

Pri tri lingvoj

Ni vidas do ke inter la jidparolanta intelektularo estis eĉ tri lingvoj kiuj estis ellaboritaj aŭ prilaboritaj en la okdekaj jaroj aŭ poste. Ĉe la jida temas pri ŝanĝo de statuso.

Estas interese noti ke kaj la hebrea kaj esperanto estis ne tre parolataj lingvoj, dum la jida jes. Tamen, kiam oni fondis la ŝtaton Israelo, ne la jida, jam tre parolata lingvo, sed la hebrea, ankoraŭ ne plene evoluigita por nuntempa vivo, estis elektita.

3. Alvoko al la juda intelektularo

Zamenhof verkis, probable “ĉirkaŭ 1901” laŭ Adolf Holzhaus (Zamenhof 1982:2), en la rusa lingvo kvardektri-paĝan tekston kun la titolo *Alvoko al la juda intelektularo*. Sed li ne publikigis ĝin. Nur en 1982 Holzhaus publikigis ĝin (Zamenhof 1982:71–116) kune kun traduko en esperanton (1982:117–144). La lastan represis Ludovikito (zamenhof 1990:1071–1115).

La aŭtoro demandas: “*en kies nomo propre ni suferas kaj kondamnas al senfinaj suferoj niajn infanojn kaj nepojn kulpaĵn en nenio?*” (1982:120, 1990:1075). La leganto ricevas la impreson ke ili eble suferas ne nur maljuste, sed ankaŭ malnecese.

La judoj ne estas francoj, germanoj, poloj k.t.p. de Mosea religio: li forte neas la ideon ke judeco konsistas nur el religio. La tuta Mosea religio estas bazita sur nacieco. Popolo estas ĝenerale dirite difinita per sia lingvo, sed la judoj ne havas komunan lingvon. La jida ja estis geografie limigita, sed ankaŭ, laŭ la opinio de Zamenhof, nesufiĉe evoluinta – aŭ nesufiĉe evoluigita. Pri ĝi li skribas:

Se ni tiun ĉi lingvon kulturis kaj devigus niajn infanojn kaj nepojn paroli ĝin, tio ĉi donus al ni iun rajton nomi nin aparta popolo. (1982:125, 1990:1083)

Tio donus al la popolo nacian memkonscion,

sed ĉar kulturadon de tia okcidente-ruse-germana popolo, deklaranta Balte-Nigromaran strion⁵ sia patrujo, kaj ĵargonon sia lingvo, nek unu el la judaj partioj opinias dezirinda,

⁵Tiu “Balte-Nigromara strio” estis la setliĝa zono de la judoj, kiu ekzistis inter 1791 kaj 1917. En la rusa ĝi nomiĝis черта оседлости, *ĉertá osédlosti*, en la pola *strefa osiedlenia*, en la angla *Pale of Settlement*.

nek iomete laŭcela aŭ havanta iaajn ŝancojn por estonteco, tial ni pri ĝi tute ne parolos. (1990:1083–1084)

La religio estas la sola elemento kiu donas al la judoj identecon de popolo, sed ĝi do ne sufiĉas. Ankaŭ la lingvo jida ne sufiĉas, ĉar ĝi estas tro malforta: li kutime nomas ĝin ne lingvo sed “ĵargono” aŭ “dialekto”; vidu sekcion 2.

Ĉu la cionismo estas solvo? Ne, ĝi estas utopio:

Gajnos, sekve, nur tre malgranda parto de la juda popolo, kiu havos eblon enmigri Palestinon; la tuta cetera granda plimulto, kiu ne havos eblon migri tien, ne nur nenion gajnos, sed ilia stato konsiderinde malboniĝos, ĉar tiam niaj persekutantoj ricevos ian moralan bazon sub la piedoj kaj sur ĉiu paŝo krios al ni: ‘vi foriru en vian Palestinon!’ (1982:129, 1990:1090)

Li atentigas pri ebla elpelo estonta de la judoj el Palestino: “la judoj en Palestino estos eterne kiel sur vulkano; [...] en Palestino ne ĉesos premoj kaj ribeloj, ĝis ĉio tio ĉi finiĝos per nova elpelo de la judoj.” (1982:129, 1990:1091).

La juda popolo travivis en fremda medio dum jarmiloj. Kio estas la vera kaŭzo de tiu ĉi longedaŭra travivado? La respondo de Zamenhof estas:

Ŝajna firmeco kaj viveco de la judoj devenas nur de tiuj nevenkeblaj muroj, per kiuj ĉirkaŭantaj religioj pro siaj dogmoj neeblaj por la judoj, kaj la hebrea religio pro sia anakronisme-nacia karaktero ĉirkaŭis la judan popolon. (1982:134, 1990:1098)

Pri aliaj eblaj solvoj li argumentas nee. Senreligieco ne estos ebla (1982:131–132, 1990:1094–1095). Kristanismo ankaŭ ne (1982:132, 1990:1095). Tiam li alvenas al hilelismo, kies unuaj “punktoj” estas:

1. Ni sentas kaj rekonas ekziston de la plej alta Forto, reganta la mondon, kaj tiun ĉi Forton ni nomas Dio.
2. Siajn leĝojn Dio enmetis en la koron de ĉiu homo en formo de konscienco; tial vi ĉiam obeu la voĉon de via konscienco, ĉar tio ĉi estas neniam eksilentanta voĉo de Dio.
3. Esenco de ĉiuj leĝoj, donitaj al ni de Dio, esprimas sin per la formulo: ‘agu kun aliaj tiel, kiel vi volus, ke aliaj agu kun vi, kaj faru iam nek evidente, nek kaŝite tiajn agojn, pri kiuj via interna voĉo diras al vi, ke ili ne plaĉas al Dio.’ Ĉiuj do ceteraj religiaj instruoj, kiujn vi ekaŭdos iam de viaj instruistoj kaj gvidantoj kaj kiuj ne enestas en la ĉefaj tri religiaj punktoj, faras nur homajn komentariojn, kiuj en religia rilato estas devigaj al vi nur en tia okazo, se voĉo de koro diras al vi, ke komentarioj estas veraj. (1982:135–136, 1990:1101)

Ni rimarkigu ke li faras el la plimulto de la religiaj dogmoj, moroj kaj kutimoj . . . “nur homajn komentariojn”. Kiu religiema persono akceptus tion? Tamen ŝajnas ke tiu frazo venas de Talmudo: “Kio ne estas agrabla al vi, ja / tion ne faru al homo alia. / Jen la tuta religio, / la cetero nur komentario.” (Talmudo, Ŝabat, p. 31a, citita laŭ Maimon 1978:181.)

Nova lingvo “faras nedivideblan ingrediencon de tiu Hilelismo, pri kiu ni revas. Tio ĉi estas starigo de komuna neŭtrala diserva lingvo por ĉiuj hilelistaj temploj, en kiu ajn lando ili estus.” (1982:136, 1990:1102). Oni povas kompari kun la rolo de latino en la katolika eklezio. Tiu komuna neŭtrala diserva lingvo estas tamen nur propono (1982:137, 1990:1103).

4. La hilelismo de 1901

Zamenhof verkis kaj publikigis en Varsovio en 1901 ruslingvan sepdekok-paĝan libreton kun la titolo (tradukite) *Hilelismo. Projekto pri solvo de la hebrea demando*. Li faris tion sub la pseŭdonimo *Homo Sum*.

La verko portas la daton 1901-01-29 (laŭ la julia kalendaro; tio respondas al 1901-02-11 laŭ la gregoria). Tio estas la dato de la cenzura permeso; la ellaso fare de la cenzuro okazis kredeble kelkajn semajnojn poste. (La cara cenzuro faris por ĉiu libro du decidojn: la unua, post kontrolo de la manuskripto, estis la permeso komposti kaj presi; la dua, post kontrolo de la presita verko, estis la permeso ellasi.)

Tiu ĉi broŝuro estis presita kaj formale publikigita (kun la cenzura proceduro kaj ĉio), sed la tuta stoko estis kaŝita: “en la jaro 1903 mi post multaj klopodoj ricevis returne ĉiujn ekzemplerojn de mia broŝuro kaj kaŝis ilin en mia ŝranko” (Letero 1905-09-24 al Javal; 1948a:205, 1990:1601).

La ruslingvan originalon kun traduko en esperanton publikigis Adolf Holzhaus (Zamenhof 1972); la tradukon represis Ludovikito (zamenhof 1990:1123–1205). Pierre Janton publikigis tradukon en la francan kune kun enkonduko kaj analizo de la teksto (Zamenhof 1995). Aleksander Korĵenkov publikigis korektitan esperantan tradukon de la ruslingva teksto (Zamenhof 2006:39–96) kun notoj (2006:258–262).

La libro *Hilelismo* estas antaŭiranto de *Homaranismo*. Zamenhof evidente ne volis (post 1903) ke ĝi estu konata. Kial? En la libro li volas krei religion kiu ne malhelpas la ensorbiĝadon de la hebreaĵoj. Temas pri religio por la judoj, ne por iu ajn, kiel la posta homaranismo:

Radiko de la tuta hebrea demando enestas, kiel ni vidis supre, en la hebrea *religio*; do restas neniam dubo en tio, ke solvo de la hebrea demando estas ebla nur kaj sole per vojo de ŝanĝo de la hebrea *religio*, kaj ĉiuj ceteraj provoj de solvo de la hebrea demando estos nur perdo de tempo kaj ĉerpo de akvo per kribrilo kaj anstataŭ niaj grandaj oferoj alportos al ni nur novan vicon de seniluziigoj kaj konstantan malboniĝon de nia stato. (1972:27, 1990:1150–1151, 2006:58)

Do, ni devas ŝanĝi la hebrean religion. Antaŭ ĉio necesas ŝanĝi, kompreneble, tiun elementon, kiu, kiel ni supre vidis, konsistigas la tutan esencon kaj kaŭzon de la eternaj hebreaĵoj suferoj, t.e. *falsan naciecon* de la religio, kiu por kelkaj jarmiloj haltigis en la hebrecio ĉiun kapablecon de difuzo kaj eblon de libera evoluo [...] (2006:62; kp. 1972:32 kaj 1990:1156 kun iom alia vortumado)

Per tiuj vortoj li alvenas al la hilelismo, “nova religia partio, kiun ni intencas fondi en la sino de ĝis nun ekzistanta hebrea religio [...]” (1972:39, 1990:1163; kp. 2006:67 kun iom alia vortumado).

Pri la religio de la judoj li uzas fortegajn vortojn:

Kunluteco de nia religio kun nacieco kaj teritorio de ĝiaj fondintoj kaj rezultanta el tio ĉi ĝia ŝtonigitaĵo kaj eterna alforĝo nia al kadavro de longe malaperinta ŝtato kaj popolo. (1972:53, 1990:1178; kp. 2006:77 kun iom aliaj vortoj)

Jen kiel li vidas sian propran sorton: kunluteco (en la rusa originalo спаянность, *spajannost'*, el la verbo спаивать, спаять, *spáivat'*, *spaját'* ‘kunluti’), ŝtonigitaĵo (fosilio, ruse окаменѳлость, *okamenělost'*) kaj kadavro (ruse трупъ, *trup''*)!

Sed la judoj, aŭ almenaŭ tiu parto de ili kiu havas la novan religion, devos havi ankaŭ lingvon. Li mencias tri eblojn: “1) aŭ *la antikva hebrea lingvo*, 2) aŭ unu el *ĵargonoj*, uzataj de nunaj hebreoj (ekzemple ĵargono de ‘litoviaj’ hebreoj), 3) aŭ speciale kreita por tiu ĉi celo lingvo *neŭtrala, arta*. Tamen *praktike* povas esti nur unu respondo – nome la tria.” (2006:81; kp. 1972:58, 1990:1184).

Sed la lingvo de la hilelistoj ne estu esperanto. Ja ĉiuj popoloj bezonas lingvon por eksteraj rilatoj (temas do nun pri esperanto), sed la hilelistoj bezonas lingvon ankaŭ por siaj internaj rilatoj. Ilia lingvo havu aliajn ecojn ol la neŭtrala esperanto: “ĝi devas esti adaptita *speciale al la bezonoj de hilelistoj*”. “[...] dum la ekzistanta lingvo Esperanto havas severe *internacian* spiriton, bazitan nur sur unu pura *logiko*, la lingvo de hilelistoj devos esti adaptita speciale al la spirito, vivo, pensmaniero kaj esprimoj, specifecoj kaj kutimoj de tiuj homoj, kiuj fondos unuan kontingenton de hilelistoj [...]” (2006:83; kp. 1972:60, 1990:1186).⁶

Mi citu la esencon de la projekto:

1. **Purigi la hebrean religion** por ke ĝi ĉesu esti por ni eterna malhelpaĵo en ĉio, kaj por ke ĉiu el ni povu sen hipokriteco kaj memkontraŭparolo malkaŝe kaj fiere konfesi sian religion kaj edukadi en ĝi siajn infanojn.
2. **Krei por la hebreoj propran lingvon** por ke ni, se sorto destinis al ni esti popolo, ĉesu esti eternaj nuloj kaj spiritaĵoj inter popoloj.
3. **Elekti ian difinitan lokon**, kie povus komenci koncentriĝi ĉiuj tiuj hebreoj, kiuj pro io decidiĝas elmigri el sia natura patrujo kaj volus vivi inter la siaj. (2006:95; kp. 1972:76–77, 1990:1204)

Rezulte: “Hebreeco fine ĉesos esti eterna malfeliĉo, hebreoj fariĝos similaj al ĉiuj ceteraj homoj. Ni havos koralligiĝon al io, ni havos esperon al io.” (1972:76, 1990:1203, 2006:95).

En la libro Zamenhof komencas per diskuto pri la ecoj kiuj plej gravas por konsistigi popolon. Kio estas la ĉefaĵo en la difino de popolo? Vi povas forpreni de popolo ekzemple la politikan memstarecon; ĝi tamen restas popolo; vi povas forpreni la terpecon sur kiu ĝi vivas; terura bato, sed la popolo tamen restas popolo. Sed se vi forprenas de popolo la lingvon, tiam ĝi ne plu estas popolo. “*Ĉar lingvo estas ĝuste tiu ligo kiu faras tiun aŭ alian grupon da homoj popolo*” (1972:10, 1990:1131, 2006:44).

Ni ne devas esti surprizitaj ke lingvo estas tiom grava por li en la difino de popolo. Ni ja scias ke Zamenhof opiniis la malsamecon de la lingvoj la ĉefa kaŭzo de la malamikeco inter la popoloj.

Sed por mi la paradokso estas la jena: se lingvo estas tiom grava, kiel oni povas tute arbitre enkonduki novan lingvon? Se tia operacio entute eblas, ĉu ĝi ne per si mem montras tute konvinke ke la lingvo ne gravas? Lingvo estas ĉiom grava, sed samtempe tiom malgrava ke oni povas anstataŭigi ĝin per tute nova, senhistoria. Vere paradokse.

La libro prezentas grandiozan projekton por solvi la judan demandon. La judoj estas malfeliĉaj: ni do ŝanĝu ĉion por ili kontraŭ io alia, io tute nova. Ni ŝanĝu unue la religion, due la lingvon, trie la lokon (ni trovu novan terpunkton kie ili povas loĝi).

⁶Ĉi tie mi menciu ke Waringhien (1953:6) maltrafis tiun punkton kaj parolas pri esperanto kiel la lingvo de la hilelistoj.

Do tre profundaj ŝanĝoj. Ni kutime konsideras religion, lingvon kaj teron kiel tre fiksaĵn cirkonstancojn de la homa vivo. Sed Zamenhof volas ilin ĉiujn tute ŝanĝi. Tion oni kelkfoje nomas socia inĝenierarto. Persono kiu faras tiajn proponojn devas havi grandan memfidon – aŭ ĉu estas liaj teruraj spertoj kiuj donis al li nenium alian eliron?

Zamenhof skribis en letero 1901-05-28 al Abram Kofman (1864/1865–1940):

Ne timu tamen, ke la projekto de hilelismo kun lingvo neŭtrala estos danĝera por Esperanto! Ho ne, ho ne! Mi estas certa, ke, se Vi bone pripensos la aferon, Vi venos al la konvinko, ke ambaŭ demandoj estas tre malvaste kaj nedisigeble ligitaj inter si. Tiel same kiel la hilelismo ne povos ekzisti sen lingvo neŭtrala, tiel same la ideo de lingvo neŭtrala *neniam povos vere efektiviĝi sen hilelismo!* (Letero 1901-05-28 al Kofman; 1948a:19, 1990:1208–1209)

Rapide kiel fulmo Volapük falis; ankaŭ esperanto povos fali. La hilelismo estos do ia garantio, kiun la senreligia Volapük ne havis.

Jes, mi estas profunde konvinkita, ke nek solvo de la hebrea demando, nek enradikiĝo de lingvo neŭtrala estos iam ebla sen *hilelismo*, t.e. sen kreo de *neŭtrala popolo*. (Letero 1901-05-28 al Kofman; 1948a:20, 1990:1209)

Do la judoj fariĝos neŭtrala popolo, kiu parolas neŭtralan lingvon, kaj poste iu ajn povas aliĝi. Jen la penso! Tio ne akordas kun la libro pri hilelismo, ĉar tie, kiel ni vidis, la lingvo ja estos iu alia ol esperanto, kun tute aliaj ecoj.

5. Leteroj de Zamenhof antaŭ la Bulonja kongreso

La unua kongreso de esperanto okazis en Bulonjo ĉe maro 1905-08-05—13, kaj dum tiu jaro Zamenhof multe korespondis i.a. pri la hilelismo, kaj antaŭ kaj post la kongreso. Tre gravan leteron li skribis 1905-02-21 al la advokato Alfred Michaux (1859–1937), la ĉefa organizanto de la kongreso (1948a:105–115).

La necesecon de lingvo sennacia, neŭtrale *homa* neniuj povas senti tiel forte, kiel hebreo, kiu estas devigata preĝi al Dio en jam longe mortinta lingvo, ricevas sian edukadon kaj instruadon en lingvo de popolo, kiu lin forpuŝas, havas samsuferanojn en la tuta mondo kaj ne povas kun ili kompreniĝadi. (Letero 1905-02-21 al Michaux; 1948a:107, 1990:1438, 2006:100)

Tio eble estas la plej rekta klarigo pri lia motivo kiun mi iam ajn legis. Ni jam ĉi tie vidas tri tre malsamajn rolojn de lingvo: la diserva lingvo (en lia kazo la hebrea), la instrua lingvo (en lia kazo la rusa) kaj la lingvo por interkompreniĝo kun samsuferanoj (samgentanoj aŭ samreligianoj) en aliaj landoj (en lia kazo mankanta).

Pri la revo pri unuiĝo de la homaro li skribas:

Tiu ĉi ideo estas la esenco kaj celo de mia tuta vivo, la afero Esperanta estas nur parto de tiu ĉi ideo – pri la tuta cetera parto mi ne ĉesas pensi kaj revii; kaj pli aŭ malpli frue (eble tre baldaŭ), kiam Esperanto jam ne bezonos min, mi elpaŝos kun unu plano, por kiu mi jam de longe prepariĝas kaj pri kiu mi ian alian fojon eble skribos al vi. Tiu ĉi plano (kiun mi nomas ‘Hilelismo’) konsistas en la kreado de morala ponto, per kiu povus unuiĝi frate ĉiuj popoloj kaj religioj, sen la kreado de iaj nove elpensitaj dogmoj kaj sen la bezono, ke la popoloj forĵetu siajn religiojn ĝisnunajn. (Letero 1905-02-21 al Michaux; 1948a:107, 1990:1438, 2006:100)

En “la daŭro de la lastaj 5 jaroj”, t.e. de 1900 ĝis 1905, “mi devis ofte ŝanĝadi kaj reŝanĝadi la planon de mia ‘Hilelismo’ kaj ĝis nun mi ne venis ankoraŭ al ia definitiva kaj lasta decido” (Letero 1905-02-21 al Michaux; 1948a:108, 1990:1439, 2006:100).

Li klare mencias la malfacilon elekti inter du celoj: “[...] tre ofte turmentadis min la penso, ke mi ne havas la moralan rajton laboradi por idealoj neŭtrale homaj, kiam mia popolo tiom multe suferas kaj havas por si tiom malmulte da batalantoj.” (Letero 1905-02-21 al Michaux; 1948a:108, 1990:1439, 2006:101).

Longan tempon en mia juneco mi estis varmega ‘sionisto’ (tiam la sionismo ne estis ankoraŭ en modo, mi estis unu el la unuaj pioniroj de tiu ĉi ideo kaj tiam miaj sampopolanoj forte mokadis min kiam mi kun juna flameco kaj profunda kredo paroladis al ili pri la rekonstruo de la Palestina hebrea regno). Mi laboris energie por tiu ideo, mi fondis sukcese la unuajn grupojn sionistajn. (Post 3–4 jaroj de energia laborado por la sionismo mi venis al la konvinko, ke tiu ĉi ideo kondukos al nenia celo kaj tial mi forĵetis tiun ĉi ideon, kvankam en la *koro* ĝi restis por mi ĉiam kara, kiel agrabla sed neplenumebbla revo; kiam en 1897 naskiĝis la granda sionista movado aranĝita de Herzl, mi jam ne povis aliĝi al ĝi.) (Letero 1905-02-21 al Michaux; 1948a:108–109, 1990:1439–1440, 2006:101)

Ŝlosila por mia kompreno de lia pensado mi trovis la jenon:

[...] de mia plej frua infaneco en mi ĉiam superregadis la ‘*homo*’, tamen pro la malfeliĉega stato de mia popolo, en mia koro ofte vekigadis la ‘*patrioto*’, kiu terure bataladis en mia koro kontraŭ la ‘*homo*’. En la lastaj 10 jaroj la ‘*homo*’ kaj ‘*patrioto*’ iom post iom interpaciĝis en mia koro en formo de ‘Hilelismo’ [...] kies esencon mi kredeble publikigos post unu aŭ du jaroj. Unu libron pri la Hilelismo difinitan speciale por la rusaj hebreoj kaj verkitan en lingvo rusa mi jam publikigis (sub la tre sekreta pseŭdonimo ‘Homo sum’) antaŭ kvar jaroj; sed pri tiu ĉi libro preskaŭ neniu scias, ĉar mi sendis ĝin al neniu gazeto kaj nur cirkuligis ĝin kiel ‘ballon d’essai’ [provbalono] inter negranda nombro da inteligentaj hebreoj. (Letero 1905-02-21 al Michaux; 1948a:110, 1990:1441, 2006:102)

Dum la jaro 1905 Zamenhof multe korespondis kun Louis Émile Javal, franca okulkuracisto (1839–1907). Sed ekzistis ankaŭ alia ligo inter la du homoj: “Tre agrabla surprizo estis por mi la sciigo, ke Vi kaj s-ro Moch apartenas al tiu sama raso, al kiu mi mem apartenas.” (Letero 1905-07-10 al Javal; 1948a:167, 1990:1546; Gaston Moch (1859–1935) estis prezidanto de la pariza grupo de esperantistoj kaj membro de la Lingva Komitato).

6. Leteroj de Zamenhof post la Bulonja kongreso

Hejmenveninte post la Bulonja kongreso Zamenhof skribis leteron al Javal 1905-08-30 kaj denove tre gravan leteron 1905-09-24. En la laste menciita li parolas pri du projektoj: pri lingvaj reformoj kaj pri hilelismo. Pri la dua:

Tiu ĉi projekto, kiun mi pli aŭ malpli frue intencas prezenti al la mondo sub la nomo de ‘Hilelismo’ estas la plej grava el ĉiuj laboroj, kiujn mi iam faris aŭ faros. Ĝi prezentas per si en plena finiteco tiun ideon, al kiu mi dediĉis mian tutan vivon; la tuta afero Esperanta estas nur *parto* de tiu komuna ideo, kiun mi nomas Hilelismo. (Letero 1905-09-24 al Javal; 1948a:199, 1990:1595, 2006:115–116)

Do la hilelismo estas pli grava ol esperanto. Li daŭrigas: “La celo de la Hilelismo estas: unuigi la homaron en unu fratan familion (ne timu, mi ne fantazias).” (Letero 1905-09-24 al Javal; 1948a:200, 1990:1596, 2006:116). La celo do estas tute alia ol tiu de la projekto en la *Alvoko* kaj en la Hilelismo de 1901.

Tiu ĉi malgranda popolo, kiu havus sian konstantan kulturan centron kaj centran templon en unu el la urboj de la neŭtrala Svisujo, prezentus fundamentan grupon, kiu iom post iom ensorbus en sin ĉiam pli da homoj el ĉiuj nacioj kaj estus la komenco de la estonta lingve kaj religie unuigita homaro. [...] post multaj jarcentoj [...] la dua religio de ĉiu homo [...] En sia *domo* ĉiu hilelisto povos paroli sian *gepatran* lingvon aŭ dialekton kaj vivi laŭ la moroj de sia gepatra religio; sed en ĉiuj lokoj kaj aferoj *publikaj* la hilelistoj neniam altrudos al aliaj personoj sian propran lingvon aŭ religion, sed penos, ke tie regu nur lingvo kaj religio *neŭtrale-homaj*. (Letero 1905-09-24 al Javal; 1948a:200–201, 1990:1601–1602, 2006:120)

“Jam pli ol ses jarojn mi konstante ŝanceliĝas pri tio, ĉu oni devas enkonduki la hilelismon antaŭe inter la *hebreoj*, aŭ tuj proponi ĝin al personoj de *ĉiuj* popoloj. Tiu ĉi mia ŝanceliĝo ĝis nun ankoraŭ ne finiĝis [...]” (Letero 1905-09-24 al Javal; 1948a:205, 1990:1601–1602, 2006:120). Jen do tre grava klarigo laŭ mi.

En letero al Friedrich Schneeberger (1875–1926) Zamenhof komencas plani por la Dua Kongreso en Ĝenevo. En tiu ĉi letero (kies tuta teksto ne estas en la volumo (1948a) redaktita de Waringhien; vidu do Ludovikiton (zamenhof 1990:1605–1607c aŭ Zamenhof 2006:121–122)) li avertas ke li volas prezenti en la venonta kongreso en Ĝenevo “aferon tre gravan, kiu estas la plej necesa plenigo de la afero Esperanta kaj pri kiu mi revis kaj laboris en la daŭro de mia tuta vivo [...]” (Letero 1905-10-02 al Schneeberger; 1990:1607, 2006:122).

Sed jam en la sama monato li komencas bedaŭri: “Pri miaj hilelistaj intencoj Vi povas esti tre trankvila. Mi scias tre bone, ke en multaj landoj oni nun akceptus mian ideon kun tre granda malamikeco. Mi agos tre singarde kaj mi faros nenian publikan paŝon, ĝis mi havos plenan certecon, ke tiu paŝo ne malutilos al Esperanto.” (Letero 1905-10-25 al Javal; 1948a:213; 1990:1614). Kaj du tagojn poste: “Mi scias tre bone, kia grandega danĝero povus aperi por la afero Esperanta, se mi ligus la hilelismon kun la esperantismo. Estu tute trankvila!” (Letero 1905-10-27 al Michaux; 1948a:214, 1990:1616). Komparu tion kun la citita letero 1901-05-28 al Kofman (paĝo 48)!

En decembro li trovis solvon: “Forte puŝata de la cirkonstancoj, mi decidis ne atendi plu, sed elpaŝi jam *nun*. Sed por ne alporti malutilon al la afero Esperanta, mi decidis publikigi la esencon de la Hilelismo tute *anonime*.” (Letero 1905-12-30 al Javal; 1948a:233, 1990:1636, 2006:126). La cirkonstancoj pri kiuj li parolas plej kredeble estis la revolucio en Ruslando de 1905 kaj la postaj persekutoj de la judoj.

Ia fino al la vico de liaj leteroj el 1905 estas la jena el januaro 1906:

Laŭ mia profunda konvinko la Hilelismo prezentas la solan veran kaj justan solvon de ĉiuj naciaj kaj religiaj demandoj, kaj la vero kaj justeco pli aŭ malpli frue *devas* venki, kiel ajn forte oni ĝin atakadus en la komenco. Mi nur forte bedaŭras, ke mia ruinigita sano kaj la ĉiam kreskantaj devoj rilate mian familion ne permesas jam al mi labori tiel energie, kiel mi dezirus; [...] (Letero 1906-01-08 al Javal; 1948a:236, 1990:1649, 2006:127)

7. La hilelismo kaj homaranismo de 1906

En la jaro 1906 Zamenhof publikigis anonime en *Ruslanda Esperantisto* artikolon nomitan *Dogmoj de Hilelismo* (1983:313–321, 1990:1672–1682, 2006:127–135). “La principa ideo de la hilelismo naskiĝis antaŭ dek jaroj, sed ĝi havis iom alian karakteron kaj estis destinita tiam speciale por unu homa grupo, por reguligi la rilatojn de tiu ĉi grupo al la ĉirkaŭanta mondo [...]” (1983:314, 1990:1673, 2006:127–128).

La sukceso de la Bulonja kongreso donis al Zamenhof impulson fari elpaŝon pri la hilelismo en Ĝenevo, kie oni planis okazigi la Duan Kongreson.

Fina celo de la Hilelismo.

La hilelistoj esperas, ke per konstanta reciproka komuniĝado sur la bazo de neŭtrala lingvo kaj neŭtralaj religiaj principoj kaj moroj la homoj iam kunfandiĝos en unu neŭtrale-homan popolon, sed tio ĉi fariĝados iom post iom, nerimarkate kaj sen ia rompado. (1983:316, 1990:1676, 2006:130)

La *Deklaracio de Hilelismo* (1983:316–321, 1990:1676–1682, 2006:130–135) konsistas el dek du punktoj pri religio, lingvoj kaj moroj. La unua tekstas:

Mi estas homo, kaj por mi ekzistas nur idealoj pure homaj; ĉiajn idealojn kaj celadon gente-naciajn mi rigardas nur kiel grupan egoismon kaj hommalamon, kiuj pli aŭ malpli frue devas malaperi kaj kies malaperon mi devas akceladi laŭ mia povo.

El la punkto 9:

En mia familia vivo mi povas uzadi kiun lingvon mi volas, sed mi devas ĝin nomi ne mia nacia, sed nur mia lingvo *familia*. Kiam oni min demandas pri mia lingvo *nacia*, mi devas respondi: ‘la ekzistadon de lingvoj naciaj mi ne konfesas, ĉar ĉiu nacio nuntempa parolas per multaj lingvoj; sed mia lingvo *genta* estas jena (nome tiu lingvo aŭ dialekto, kiun en mia patrujo parolas la plimulto de mia gento, se eĉ mi mem tute ne posedas tiun ĉi lingvon).’ (1983:319, 1990:1680, 2006:133)

Ŝajnas ke li ĉi tie, same kiel en aliaj lokoj, pensas pri judo kiu ne parolas la jidan.

En 1906 aperis nova broŝuro titolita *Homaranismo*, ĉi-foje kaj en la rusa kaj en esperanto; la esperanta teksto estas publikigita en (1983:324–328, 1990:1695–1705, 2006:139–146). Jen do ŝanĝo de nomo. Ĝi aperis anonime en Peterburgo. “*La homaranismo estas celado al pura homeco kaj al absoluta intergenta justeco kaj egaleco.*”

La ideo de homaranismo naskiĝis de la antaŭe ekzistinta ideo de ‘hilelismo’, de kiu ĝi distingiĝas nur per tio, ke la hilelismo koncernis nur unu homan grupon, dum la homaranismo koncernas ĉiujn popolojn kaj religiojn. (1983:324, 1990:1695)

Tio ja ne kongruas kun la artikolo en *Ruslanda Esperantisto* (vidu la ĵus cititan “Fina celo de la Hilelismo”).

La sukceso de la Bulonja kongreso neniigis ĉiujn dubojn pri la formulado de la dogmoj. La aŭtoro atentigas pri la eltenemo de sia projekto: “*La homaranoj faras al si nenian iluziojn kaj tial ili timas nenian disreviĝon.*” (1983:325, 1990:1697, 2006:140). “Ĉar la homaranismo estas ne ‘entrepreno’, kies valoro dependas de ĝia atendata sukceso aŭ malsukceso, sed nur ‘principaro’, kaj ĉiu homo fortike konservas sian principaron tiel longe, kiel ĝi estas konsenta kun liaj konvinkoj, sendepende de tio, ĉu ĝi havas multe da partianoj aŭ malmulte.” (1983:325–326, 1990:1697, 2006:140).

La *Deklaracio de Homarano* (1983:326–328, 1990:1699–1705, 2006:141–146) estas preskaŭ la sama kiel la *Deklaracio de Hilelismo* en la artikolo en *Ruslanda Esperantisto*.

Pri la lingvo mi citas el la punkto 9 de la deklaro:

En ĉiuj homaranaj kunvenoj kaj, kiom eble, ankaŭ en ĉiuj privataj komunikigoj kun homaranoj mi devas uzi la lingvon homaranan. [...] Ĉar en la nuna tempo ekzistas nur unu neŭtrala lingvo, nome Esperanto, tial la homaranoj akceptas ĝuste ĝin; tamen ili rezervas al si la rajton anstataŭigi iam poste tiun ĉi lingvon per alia lingvo, se tio montriĝos utila. (1983:328, 1990:1703, 2006:144)

Ni vidas ĉi tie neniun fidelecon al esperanto.

El la punkto 10:

Mia religio mi nomas tiun religion, en kiu mi naskiĝis, aŭ al kiu mi estas oficiale alskribita; sed al ĝia nomo mi devas ĉiam aldoni la nomon ‘homarana’, por montri, ke mi konfesas ĝin laŭ la religiaj principoj de la homaranismo, kiuj konsistas en jeno:

a) Sub la nomo ‘Dio’ mi komprenas tiun al mi nekompreneblan plej altan Forton, kiu regas la mondon kaj kies esencon mi havas la rajton klarigi al mi tiel, kiel diktas al mi mia saĝo kaj koro.

b) Kiel fundamentan leĝon de mia religio mi rigardas la regulon ‘agu kun aliaj tiel, kiel vi deziras ke aliaj agu kun vi, kaj aŭskultu ĉiam la voĉon de via konscienco’; ĉion alian en mia religio mi rigardas nur kiel legendojn aŭ kiel religiajn *morojn*, kiuj estas enkondukitaj de homoj, por enporti en la vivon difinitan programon kaj spiritan varmon, kaj kies plenumado aŭ neplenumado dependas de mia persona deziro. (1990:1703–1704, 2006:144–145)

Tre fortaj vortoj! Ĉu religia persono akceptus ke “ĉio alia” estas por enkonduki difinitan programon kaj spiritan varmon? Por ne paroli pri tio ke la plenumado aŭ neplenumado dependas de la persona deziro de la unuopulo.

8. Zamenhof obeas al la kritikantoj

Dum la jaro 1906 Zamenhof ricevas de la francaj esperantistoj akran kritikon pri sia religia projekto. Lia korespondado dum tiu jaro konsistas el ia retroiro. Li skribas ekzemple: “Ĉar la nomo de mia broŝuro (pri la dogmoj) estas tro hebrea kaj la antaŭparolo tro rusa, tial mi decidis presigi tute *novan* eldonon de mia broŝuro.” (Letero 1906-02-20 al Aleksandr Asnes; 1990:1691).

Alia parta retroiro temas pri la landoj: “[...] ke la afero estas destinita (almenaŭ en la nuna tempo) ne por tiaj landoj, kiel ekzemple Francujo, sed nur por landoj diversgentaj; (por la francoj la homaranismo povus eble havi kelkan intereson en tiuj provincoj, kiuj transiris al Germanujo).” (Letero 1906-04-23 al Javal; 1990:1723, 2006:151). La religio nun ne estas tre universala.

Li klarigas: “La homaranismo ne estas *nova* RELIGIO, ĝi estas nur *neŭtrala* PONTO, sur kiu, sen defalo de siaj tradiciaj religiaj sistemoj, povos kunveni homoj de ĉiuj gentoj. La templo de homaranoj ne estos loko de nova *kredo*, sed simple loko de renkontiĝado, neŭtrala loko, en kiu iom post iom ellaboriĝados neŭtrala moraro, neŭtrala festaro, neŭtrala etiko.” (Letero 1906-05-17 al Javal; 1990:1743, 2006:159). Kaj li estas prudenta: “Pri la homaranismo mi ripetas, ke mi dezirus sondi la opinion de la francaj gazetoj *nur en tia okazo*, se tio ĉi povas esti farata *sen danĝero por Esperanto*, sed se Vi trovas, ke la afero povas fariĝi danĝera, tiam estas pli bone ne paroli al la gazetoj.” (Letero 1906-05-26 al Javal; 1990:1749, 2006:161).

Zamenhof koncedas ke estas gravaj eraroj en la homaranismo:

[...] mi venis al la konkludo, ke la nuna formo de la homaranismo havas kelkajn tre gravajn erarojn, el kiuj la ĉefaj estas:

- 1) Donante tro gravan kaj tro tujan rolon al lingvo neŭtrala, la afero faras impreson de io tro utopia kaj kontraŭnatura;
- 2) la nekutimaj novaj nomoj por la landoj sonas tro strange;⁷
- 3) la dogmo religia havas formon tro herezan por la kredantoj kaj tro eklezian por la nekredantoj. (Letero 1906-06-08 al Javal; 1990:1760, 2006:161–162)

Ni rimarkigu ke li cedas pri la lingvo. Do denove la lingvo estas malpli grava ol la nova religio.

Louis de Beaufront (1855–1935; origina nomo Louis Eugène Albert Chevreux) kritikis la homaranismon, kaj responde aperis en *Ruslanda Esperantisto* 1906 letero subskribita de Aleksandro Naumann; laŭ Johannes Dietterle (1983:338) la verkinto devas esti Zamenhof: “La homaranismo estas nur plifortigita esperantismo.” (1983:337, 1990:1769). “[...] ĉiu esperantisto havas la rajton havi private ideojn kaj idealojn, kiajn li volas [...]” (1983:338, 1990:1771).

Finfine: li decidis silenti pri la religio en Ĝenevo – la Dua Kongreso estis okazonta tie. Dudek kvin tagojn antaŭ la malfermo 1906-08-28 li skribas:

Laŭ Via konsilo mi elĵetos el mia kongresa parolo la lastan parton tuŝantan la homaranismon kaj mi parolos nur pri la interna ideo de la esperantismo, lasante al ĉiu klarigi al si la esencon de la ideo, kiel li volas. (Letero 1906-08-03 al Javal; 1990:1774, 2006:165)

Do, la tempo ankoraŭ ne estis matura por elpaŝi kun la religio. En Ĝenevo li parolis pri la interna ideo, kiu nun, kiam ni konas la ideojn pri homaranismo, aperas kiel pala kaj svaga ĉirkaŭirado de lia plej grava temo. La parolado donas al mi la impreson de forta memcenzurado. Li certe suferis, ne povante esprimi siajn plej profundajn sentojn.

9. Planata kongreso pri neŭtrale-homa religio kaj la teksto de 1913

En la jaro 1913 Zamenhof planas kongreson somere de 1914 por starigi neŭtrale-homan religion. Sed li ne volas mem elpaŝi publike kun la religia demando: li serĉas alian personon. En letero al Carlo Bourlet (1866–1913) li demandas: “Tial mi serĉas alian personon, kiu volas preni sur sin la aranĝon de *kongreso por starigo de neŭtrale-homa religio*. Ĉu Vi ne povas trovi inter Viaj konatoj iun, kiu volas preni sur sin la aranĝon de la Kongreso?” (Letero 1913-01-30 al Bourlet; 1948b:318, 1991:2562, 2006:202). En “Letero dissendota al la plej gravaj gazetoj de la Mondo”, kiu enestas en la letero al Bourlet, li parolas nur pri “neŭtrala religio”; li ne uzas la nomon hilelismo aŭ homaranismo. La religio estas ia garantio ke la afero daŭros ne nur unu generacion, “[...] ĉar religion oni ne povas tiel facile ŝanĝi, kiel oni ŝanĝas lingvon.” (Letero 1913-01-30 al Bourlet; 1948b:320, 1991:2564, 2006:203). Denove do la alia aspekto: la religio donas ian garantion ke la lingvo pluvivos.

⁷Li ĉi tie celas sian proponon nomi la regnojn ne laŭ gentonomoj sed neŭtrale laŭ la ĉefurboj: “Peterburgregno, Parizregno”, “Varsovilando” (1990:1678).

Sed malpli ol monaton poste li rezignas pri la menciita projekto: “Ĉar mi vidas, ke mia plano pri Parizo verŝajne ne sukcesos, tial mi pripensos, ĉu mi ne povos realigi mian ideon en ia alia maniero.” (Letero 1913-02-24 al Bourlet; 1948b:324, 1991:2569–2570, 2006:207). “[...] ni povas lasi al ĉiu plenan liberecon havi tian kredon aŭ tian etikon, kiujn li havas ĝis nun, sed devas unuigi ilin per komuna *eksteraĵo*.” (Letero 1913-02-24 al Bourlet; 1948b:325, 1991:2570, 2006:208). Ĉu la nova religio estas nur eksteraĵo? Kion li do volas, vere? Ĉu ne restas preskaŭ nenio?

Sed du monatojn poste li volas publikigi la projekton pri homaranismo; temas pri projekto “(kiun mi en ne preta formo kaj anonime elirigis antaŭ 7 jaroj kiel ‘provan balonon’)” Li “volas nun sendi la manuskripton al Hachette kun la propono eldoni ĝin en formo de broŝureto.” (Letero 1913-04-20 al Bourlet; 1948b:327–328, 1991:2574).

Tiu ĉi letero 1913-04-20 al Bourlet enhavas tekston de *Deklaracio pri homaranismo* (1948b:328–334, 1991:2575–2581, 2006:209–214). Ni povas noti kelkajn ŝanĝojn:

[...] sed en komunikiĝado kun homoj de aliaj lingvoj aŭ religioj li devas – kiom tio estas ebla – uzi lingvon neŭtralan kaj vivi laŭ etiko kaj moroj neŭtralaj. Mi konscias, ke estas dezirinde, ke la diverslingvaj loĝantoj de la sama regno, provinco aŭ urbo uzu inter si la lingvon regnan aŭ plej kulturan lingvon lokan, [...]. (Letero 1913-04-20 al Bourlet; 1948b:330, 1991:2576–2577)

Do la ruslandaj judoj parolu ruse, ne jide!

La *Deklaracio pri homaranismo* estas publikigita en esperanto en 1913, finfine sub la nomo de Zamenhof (1991:2582–2589). Punkto IV diras i.a.:

[...] sed en komunikiĝado kun homoj de aliaj lingvoj aŭ religioj li devas peni uzi lingvon neŭtralan kaj vivi laŭ etiko kaj moroj neŭtralaj. (1991:2585)

Sed nun alia lingvo povas ludi tiun rolon:

Mi konscias, ke por samregnanoj kaj samurbanoj la rolon de lingvo neŭtrala povas ludi la lingvo regna aŭ tiu kultura lingvo, kiun parolas la plimulto de la lokaj loĝantoj [...] (1991:2585)

Do, denove, la ruslandaj judoj parolu ruse, ne jide.

Pri la religiaj principoj li skribis en punkto X b):

[...] ĉion alian en la religio mi rigardas kiel aldonojn, kiujn ĉiu homo, konforme al sia kredo, havas la rajton rigardi aŭ kiel devigajn por li dirojn de Dio, aŭ kiel komentariojn, kiujn miksite kun legendoj donis al ni diversgentaj grandaj instruistoj de la homaro, kaj kiel morojn, kiuj estas starigitaj de homoj kaj kies plenumado aŭ neplenumado dependas de nia volo. (1991:2588)

Ĉi tie eta sed signifa ŝanĝo aperas: en la letero 1913-04-20 al Bourlet li parolas pri “fantaziaj legendoj” (1948b:333, 1991:2580); nun la legendoj ne plu estas fantaziaj.

En 1914 Zamenhof estis tre for de sia junaĝa emo helpi al la judoj. Oni petis lin partopreni la fondon de Hebrea Ligo en Parizo, kaj tiel li respondis, unu monaton antaŭ la komenco de la unua mondmilito:

Mi mem bedaŭrinde devas stari flanke de la afero, ĉar laŭ miaj konvinkoj mi estas ‘homarano’ kaj mi ne povas ligi min kun la celado kaj idealoj de speciala gento aŭ speciala religio. Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon kaj ke la celado de ĉiuj homoj devus esti: krei harmonian homaron, kiu dividus sin nur laŭ teritorioj, sed ne laŭ gentoj kaj religioj.

Estas vero ke la nacionalismo de gentoj premataj – kiel natura sindefenda reago – estas multe pli pardoninda, ol la nacionalismo de gentoj premantaj; sed se la nacionalismo de fortuloj estas nenobla, la nacionalismo de malfortuloj estas neprudenta; ambaŭ naskas kaj subtenas la alian, kaj prezentas eraran rondon da malfeliĉoj, el kiuj la homaro neniam eliros, se ĉiu el ni ne oferos sian grupan memamon kaj ne penos stariĝi sur grundo tute *neŭtrala*.

Tio estas la kaŭzo, pro kiu mi malgraŭ la korŝirantaj suferoj de mia gento ne volas ligi min kun hebrea nacionalismo, sed mi volas labori nur por interhoma justeco *absoluta*. Mi estas profunde konvinkita, ke per *tio* mi alportos al mia malfeliĉa gento multe pli da bono, ol per celado nacionalisma. (Letero 1914-06-30 al Wilhelm Heller; 1991:2655–2656, 2006:217–218; nekomplete citita en 1983:344–345)

10. La reviziita teksto de 1917

En 1917 Zamenhof volis publikigi modifitan tekston de sia artikolo *Homaranismo*. Li skribis al Ludwig Schiff (1864–1939) petante ke li traduku (aŭ tradukigu) ĝin en la germanan kaj sendu la tradukon al René de Saussure (1868–1943). Tiu ĉi estis promesinta presigi la germanan kaj francan tekstojn kaj dissendi ilin “al ĉiuj gazetoj de la mondo” (Letero 1917-02-15 al Schiff; 1991:2720, 2006:234; ne en 1948b).

Ni povas vidi kelkajn ŝanĝetojn; en la punkto 5 ni legas: “[...] uzante lingvon neŭtralan, etikon kaj morojn neŭtralajn, kalendaron neŭtralan k.t.p.”. Sed alia lingvo povas ludi tiun rolon: “Mi konscias, ke tie, kie ne ekzistas intergenta batalado, por samregnanoj kaj samurbanoj la rolon de lingvo neŭtrala povas ludi la lingvo regna aŭ tiu kultura lingvo, kiun parolas la grandega plimulto de la lokaj loĝantoj [...]” (1991:2726). Li nun distingas lokojn kie ne ekzistas intergenta batalado disde lokoj kie tia batalado ekzistas – distingo kiun li ne faris en 1913.

11. Konkludoj

El la dokumentoj menciitaj – la *Alvoko*, tiuj de 1901, 1906, 1913 kaj 1917 – ni povis vidi ŝanĝojn en la pensado de Zamenhof rilate al la juda demando, rilate al la rolo de lingvo kaj rilate al la religio.

Estas tempo demandi kion Zamenhof mem kredis. Li skribis, verŝajne en 1917, la jaro dum kiu li mortis:

Mia patrino estis religia kredantino, mia patro estis ateisto. En mia infaneco mi kredis je Dio kaj je senmorteco de la animo en tiu formo, en kiu min instruis mia denaskiĝa religio. Mi ne memoras tute precize en kiu jaro de mia vivo mi perdis la religian kredon; sed mi memoras, ke la plej altan gradon de mia nekredado mi atingis ĉirkaŭ la aĝo de 15–16 jaroj. (1991:2739)

Kvankam verŝajne estas nenecese aldoni tion, mi volas substreki ke tiu eldiro ja neniel signifas ke lia patro Marko ne respektis la tradiciajn kutimojn de sia “gento”: Marko ja ekzemple estis lernejestro kaj certe perdus lernantojn se li ne estus rigardata kiel modela tradicioportanto. La kredo pri kiu parolas Zamenhof en tiu ĉi citaĵo ja estas privata afero, la religiaj kaj kulturaj kutimoj ne.

La rolo de la artefaritaj lingvoj estis tre malsamaj en la diversaj dokumentoj. *Unue:* En la *Alvoko* de 1901(?) (1982) ĝi estas diserva lingvo de la hilelistoj, do tute ne neŭtrale-homa, kaj kiel diserva lingvo kompreneble speciala kaj ne ĉiutaga nek ĉiel uzebla. *Due:* En la libreto de 1901 la judoj de la mondo parolu neŭtralan, artan lingvon. *Trie:* Por la hilelistoj estas laŭ la sama libreto bezonata hejma hereda lingvo: ĝi estu varma, sentoplana, ne universala, ne neŭtrale-homa. *Kvare:* En 1905 la rolo de la artefarita lingvo estas denove io tute alia. Tiam la hilelistoj parolas en sia domo sian gepatran lingvon aŭ dialekton, sed en la publika vivo nur la neŭtrale-homan lingvon. *Kvine:* Kiam li estas kritikata, li malvastigas la rolon de la neŭtrale-homa lingvo, ĉar ĝi malhelpus la neŭtrale-homan religion.

Por ebligi rapidan superrigardon de la opinioj de Zamenhof pri la rolo de lingvoj kaj pri la relativa gravo de lingvoj kompare kun religio mi listigas kelkajn el la jam cititaj eldiroj. La ciferoj referencas al la kvin punktoj menciitaj en la antaŭa alineo.

<i>Eldiro</i>	<i>Fonto</i>	<i>Paĝo</i>
komuna neŭtrala diserva lingvo (1)	<i>Alvoko</i> 1901(?)	45
[Pri la jida:] sen iu celo kaj estonteco	<i>Hilelismo</i> 1901	42
neŭtrala, arta [lingvo por la judoj] (2)	<i>Hilelismo</i> 1901	47
[Alia lingvo] adaptita <i>speciale al la bezonoj de hilelistoj</i> (3)	<i>Hilelismo</i> 1901	47
<i>Ĉar lingvo estas ĝuste tiu ligo kiu faras tiun aŭ alian grupon da homoj popolo</i>	<i>Hilelismo</i> 1901	47
lingvo neŭtrala <i>neniam povos vere efektiviĝi sen hilelismo!</i>	Letero 1901-05-28 al Kofman	48
[Neŭtrala lingvo ne eblas] sen kreo de <i>neŭtrala popolo</i>	Letero 1901-05-28 al Kofman	48
[Pri la jida:] vekado de la kvazaŭ-nacia patriotismo [...] povus esti malutila	Letero 1905-02-21 al Michaux	43
“Hilelismo” estas la plej grava el ĉiuj laboroj, kiujn mi iam faris aŭ faros.	Letero 1905-09-24 al Javal	49
[Gepatra lingvo hejme; neŭtrale-homa lingvo publike] (4)	Letero 1905-09-24 al Javal	50
aferon tre gravan, kiu estas la plej necesa plenigo de la afero Esperanta kaj pri kiu mi revis kaj laboris en la daŭro de mia tuta vivo	Letero 1905-10-02 al Schneeberger	50
[Nefidelo al esperanto:] tamen ili rezervas al si la rajton anstataŭigi iam poste tiun ĉi lingvon [esperanton] per alia lingvo, se tio montriĝos utila	<i>Deklaracio de Homarano</i> 1906	52
Donante tro gravan kaj tro tujan rolon al lingvo neŭtrala [en la Homaranismo] (5)	Letero 1906-06-08 al Javal	53
[Religio estas garantio por lingvo:] religion oni ne povas tiel facile ŝanĝi, kiel oni ŝanĝas lingvon	Letero 1913-01-30 al Bourlet	53
[Nacia lingvo estas permesebla:] estas dezirinde, ke la diverslingvaj loĝantoj de la sama regno, provinco aŭ urbo uzu inter si la lingvon regnan aŭ plej kulturen lingvon lokan (5)	Letero 1913-04-20 al Bourlet	54

Ni vidas ke la penso de Zamenhof ege varias laŭ la tempo, kaj oni ne povas kompreni lian pensadon pri la rolo de la lingvo se oni ne konscias ke ĝi eble, finfine, ne estas la plej grava afero! Aŭ ĉu?

Ni vidis du grandskalajn projektojn: la savo de la judoj; la unuiĝo – aŭ unuigo – de la tuta homaro. Kaj por tion helpi li donas al arta lingvo plurajn rolojn: diserva lingvo; lingvo kiel hereda hejma lingvo; lingvo por intergentaj rilatoj. Estas kontraŭdiroj kaj malklaraĵoj. Sed se oni komprenas la du celojn de Zamenhof, oni eble iom pli bone komprenos tiujn kontraŭdirojn. Li volis savi la judojn unue donante al ili novan identecon, pli akcepteblan por la goja plimulto de Ruslando. Sed, due, li ankaŭ volis doni al la tuta homaro novan identecon – tiel la juda problemo ja solviĝus per dissolvo de la juda identeco, do de malapero de la juda identeco kiel apartaĵo.

Mi konfesu ke mi estis tre konfuzita de tiuj kontraŭdiraj ideoj. Post la legado de liaj leteroj mi estas iom malpli konfuzita. La ŝlosilo por kompreni verŝajne estas ĝuste la lukto inter “homo” kaj “patrioto” en la koro de Zamenhof. La artefaritaj lingvoj kaj la neŭtrala religio estas nur rimedoj, neniel celoj en si mem. Sed la homoj kiuj havas religian kredon ne ŝatas la personon ke ĝi estas nur rimedo, nek ke ĉio krom la ora regulo estas “nur homaj komentarioj”. Eble tie kuŝas kaŭzo kial la homaranismo ne estis akceptita. Estas malfacile imagi kiel li, kiu perdis sian religian kredon jam kiel infano, povus fondi religion. Kaj akras la kontrasto inter la publika agado de fondintoj de aliaj religioj kaj liaj broŝuroj kun dek du punktoj de homaranismaj principoj.

En unu ekstremo la arta lingvo estus la sola lingvo de la tuta homaro, en la alia ĝi estus nur helpa lingvo, nur ponto inter la kulturoj. Same pri la religioj: en unu ekstremo la religio estus tute nova religio de la judoj (malpli abomeninda por gojoj), en la alia ekstremo ĝi estus nur ponto inter la jam ekzistantaj religioj. Oni ne povas diri ke Zamenhof havis unu lingvan kaj unu religian projekton; li havis tre multajn, kaj tre dinamisme movis sin inter ili.

Liaj pensoj evoluis, certe, sed mi havas la impreson ke li pensis pri ĉiuj ebloj samtempe. Estis nur tiel ke li povis realigi de tempo al tempo kelkajn partojn de sia idearo; ekzemple li ja eldonis la unuan libron en 1887, li ja eldonis la Fundamenton en 1905 kaj multon tradukis en esperanton, dum aliaj partoj de lia idearo restis nere-aligitaj ... ĉu nerealigeblaj?

Andreas Künzli skizas en sia artikolo (2009) la gravajn taskojn kiuj atendas esploristojn de pluraj fakoj por pli bone kompreni la historian signifon de la pensado de Zamenhof kaj ĝia signifo por la nuna mondo.

Ni lernas hodiaŭ ke lingva esprimo estas principe arbitra: ne ekzistas iu motivo kial oni en iu lingvo elektis simbolon por nocio; neniu kaŭza rilato ekzistas inter signifanto kaj signifato. Tiu estas *Le principe de l'arbitraire du signe* ‘La principo pri arbitro aŭ ajneco de la signo’ de Ferdinand de Saussure (1857–1913): *le signe linguistique est arbitraire* ‘la lingva signo estas arbitra’ (1985:100).⁸

⁸Tamen ne ĉiuj signoj estas arbitraj. Charles Sanders Peirce (1839–1914) konsideris tri kategoriojn de signoj: *ikonoj*, *indicoj* kaj *simboloj*. La unuaj iel similas al siaj signifatoj (ekzemple onomatopeaj vortoj); la duaj havas iun faktan rilaton al siaj signifatoj (ekzemple la alto de la hidrarga kolono en termometro, kiu estas indico de la temperaturo); dum la triaj, la simboloj, estas tiuj signoj kiuj nur per konvencio povas ligiĝi al siaj signifatoj (ekzemple plej multaj vortoj). Pri la gravo de la ideoj de Peirce en la nuntempo vidu ekzemple Colapietro & Olshewsky (1996).

Verŝajne ĉiuj tri ekzistas en ĉiu homa lingvo, sed la simboloj estas pli oftaj.

La penso pri la arbitro aŭ ajneco de lingvaj esprimoj ne estas nova. Sanskrito estas la sankta lingvo de la hinduismo. “Sed Budho forĵetis la instruon ke ekzistas sankta lingvo, ke ekzistus necesa ligo inter lingva sono kaj la afero en la mondo al kiu la sono referencas. La lingvo baziĝas sur nuraj konvencioj kaj ne havas sian originon en la mondo de la dioj.” (Jacobsen 2009:10; mia traduko).

Kiel matematikisto mi rajtas nomi nombrojn a aŭ α aŭ x ; tute ne gravas. La rilato inter nokia enhavo kaj ties notada esprimo estas teorie konvencio absolute arbitra. Tute same: multaj kulturaj esprimoj estas ajnaj, arbitraj, sed tamen ili estas perceptataj de ni kiel tre esencaj, kaj ili iel formas nian kulturan identecon. Ekzemple, dancoj de plej diversaj popolgrupoj foje ege similas unu al la alia; tamen membroj de ĉiu grupo konsideras siajn dancojn kiel unikaĵojn kaj karakterizaĵojn de sia grupo.

Zamenhof, kiu eksperimentis per multaj lingvoj (la hebrea, la jida, pluraj variantoj de esperanto: praesperanto, la reformproponoj de 1894 (Korĵenkov 2009:99–103) kaj de 1906 (Korĵenkov 2009:207–226)), kaj kiu eksperimentis per diversaj formoj de la religio, ja komprenis tiun ĉi principan ajnecon. Sed la cetera mondo ne: ni estas kaj restas tro ligitaj al tiuj principe arbitraj sed praktike tre devigaj esprimoj de niaj pensoj kaj sentoj.

Zamenhof komprenis la ajnecon de la mondo tro bone por esti sekvata.

12. Pli persona konkludo

La konkludo ĵus farita konstatas ke estas kontraŭdiroj en la pensado de Zamenhof. Tio en si mem estas interesa trovo, sed ĝi povus doni la impreson ke tiuj kontraŭdiroj estas io malbona, kvazaŭ li ne rajtus tiel pensi. Sed por mi la afero ne statas tia. Male, mi vidas en lia vivo ĉiajn provojn plibonigi la staton de homoj, ĉu temas pri lia “gento”, ĉu pri la tuta homaro. Pro tio mi deziras, post tiu science fondita konkludo, iom pli persone demandi kion ni nun povas lerni el la skribaĵoj de Zamenhof. Kaj kiun signifon tia lernotaĵo havus por la estonteco de la homaro.

Laŭ la vortoj de Renato Corsetti (2009) ni do demandu: “Kiom ni povas lerni de Zamenhof hodiaŭ?” Ĉu neniom, ĉu iom, ĉu ĉiom?

Ni ĉiuj havas multajn personajn ecojn, kiuj kune formas nian identecon. Kaj tiu identeco estas ne nur memkomprenita, sed ankaŭ donita al ni de aliaj personoj – foje kvazaŭ stampita kontraŭ nia volo. Temas pri sekso, profesieco, etneco, ŝtataneco, religia konvinko kaj aparteneco, aĝo, seksa prefero, haŭtkoloro kaj multaj aliaj ecoj. Mi, ekzemple, estas homo (ne simio), matematikisto (ne biologo), viro (ne virino), patro, avo, svedo (ne dano), svedparolanto, esperantoparolanto, angloparolanto (kvankam ne britiano, usonano, kanadano aŭ aŭstraliano), francparolanto (kvankam ne franciano aŭ kanadano). Aliaj personoj povas doni – stampi – al mi aliajn ecojn.

Ni konsciu ke ĉiuj tiuj ecoj estas malfacile difineblaj. Ekzemple, ĉu *Australopithecus afarensis*, konata sub la nomo Dinkineŝ (angle Lucy), kiu vivis en la Afara regiono en la nuna Etiopio antaŭ pli ol tri milionoj da jaroj, estis homo? En kiu aĝo feto (kiun la patrino en kelkaj leĝistemoj rajtas abortigi) fariĝas homo (kies mortigo estas murdo)? Ni povas certi ke por neniu el la ecoj eblas doni nekontesteblan respondon.

Tro ofte ni homoj per la pronomo *ni* celas ne la homaron, sed iun apartan grupon, genton, etnon.

Nu, kion diris Zamenhof pri ĉiuj tiuj personaj ecoj? Kio estas la komuna sperto resumebla elde la pensoj esprimitaj de Zamenhof, kvankam ili, kiel ni vidis, jes ja kontraŭdiras unu la aliajn?

Grava lernotaĵo estas ke inter ĉiuj ecoj la ĉefa estu la homeco; pli precize la homaraneco. Esti homarano estas pli ol esti homo: homo povas esti unuopa individuo, dum homarano estas homo kiu konscias pri sia aneco en iu pli granda, en la tuta homaro, do pri sia rilato al ĉiuj aliaj homoj. Kaj, due, ke la aliaj ecoj, precipe la etneco, la genteco, la nacieco kaj la ŝtataneco, ofte estas tro forte sentataj por la bono de ni ĉiuj kaj nepre devas fariĝi malpli fortaj kompare kun la homaraneco. Tio estas ĝuste oferi la “grupan memamon”, kiel li skribis en 1914, jam citite en la paĝo 55.

Tio ĉi estas minimumo kion oni povas konkludi el la pensaro de Zamenhof, kaj tamen tiu minimumo estas gravega kaj daŭre restas pinte aktuala.

Dankesprimo. Mi dankas al Tsvi Sadan pro atentigo pri la nova libro de Dovid Katz (2009), citita en la enkonduko, kaj pro helpo pri fontoj rilate al la hebrea kaj la jida. Mi same dankas al Vilmos Benczik pro atentigo pri la ideoj de Charles Sanders Peirce.

Noto pri la deveno de tiu ĉi artikolo. Invitite de Islanda Esperanto-Asocio mi parolis pri tiu temo en Reykjavík 1993-08-14. Tiu prelego estas la origino de la nuna teksto, kiu tamen estas multe prilaborita. Parto de la nuna teksto estis publikigita en Blanke & Lins (2010:401–414); la sekcioj 2 kaj 12 kaj la tabelo sur la paĝo 56 en la nuna artikolo estas novaj.

Bibliografio

- Blanke, Detlev; Lins, Ulrich (red.) (2010). *La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin*. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.
- Caubel, André (1959). “Nekonato: La Zamenhofa Homaranismo”. *Sennacieca Revuo*, N-o 87, 3–17.
- Cherpillod, André (1997). *Zamenhof kaj judismo*. Courgenard: La Blanchetière. 61 pp. ISBN 2-906134-41-4.
- Clément, Michel (2009). *L’homaranisme. Doctrine spirituelle, religion ou utopie humaniste?* Tria eldono, 30 pp. Rete havebla ĉe www.adhuc.eu
- Colapietro, Vincent M.; Olshewsky, Thomas M. (red.) (1996). *Peirce’s Doctrine of Signs: Theory, Applications, and Connections*. Berlin; New York: Mouton de Gruyter.
- Corsetti, Renato (2009). “Kiom ni povas lerni de Zamenhof hodiaŭ? Neniom, iom, ĉiom”. *Esperanto*, numero 12, decembro, pp. 254–255.
- Enciklopedio de Esperanto* (1979). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio. (Represo de la unua eldono de 1933–1934.)
- Дрѣ Эсперанто [Dr’ Èsperanto; pseŭdonimo de Dr-o L. Zamenhof] (1887). Международный языкъ. Предисловіе и полный учебникъ [Meždunarodnyj yazyk’. Predislovie i polnyj učebnik’]. Varsovio: Kelter. 42 pp.
- Fellman, Jack (1973). *The Revival of a Classical Tongue: Eliezer Ben Yehuda and the Modern Hebrew Language*. Hago: Mouton.
- Gold, David L. (1980). “Towards a study of possible Yiddish and Hebrew influence on Esperanto”. En: Szerdahelyi Istvan (red.), *Miscellanea Interlinguistica*, 300–367. Budapeŝto: Tankönyvkiadó.
- Goldsmith, Emanuel S. (2000). *Modern Yiddish Culture: The Story of the Yiddish Language Movement*. Nov-Jorko: Fordham University Press.

- Гомо сумъ [Gomo Sum" (Homo Sum); pseŭdonimo de L. Zamenhof] (1901). Гиллелизмъ [Gillelism"']. Varsovio; Sankt-Peterburgo. En: Zamenhof (1972).
- Harshav, Benjamin (1999a). *Language in Time of Revolution*. Stanford, CA: Stanford University Press.
- Harshav, Benjamin (1999b). *The Meaning of Yiddish*. Stanford, CA: Stanford University Press.
- Holzhaus, Adolf (1969). *Doktoro kaj lingvo Esperanto*. Helsinko: Fondumo Esperanto. 524 pp. ISBN 951-9005-23-4.
- Jacobsen, Knut A. (2009). *Buddhismen [La budhismo]*. Stokholmo: Natur och Kultur.
- Katz, Dovid (2009). *7 Kingdoms of the Litvaks [Sep regnoj de la litvakoj]*. Vilno: International Cultural Program Center.
- Kiselman, Christer (1992). "Kial ni hejtas la hejmon sed ŝajnas fajfi pri la fajlado". *Literatura Foiro* **138**, 213–216.
- Kiselman, Christer (2008). "Esperanto: its origins and early history". En: Andrzej Pelczar (red.), *Prace Komisji Spraw Europejskich PAU*, vol. II, pp. 39–56. Krakovo: Polska Akademia Umiejętności, 79 pp.
- Korĵenkov, Aleksander (2009). *Homarano: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof*. Kalinigrado: Sezonoj; Kaŭno: Litova Esperanto-Asocio.
- Künzli, Andreas (2009). "Zamenhof-jaro 2009: Neŭtrala lingvo kaj nova humanisma etiko – la celado de d-ro L. L. Zamenhof". *Esperanto*, numero 2, februaro, 34–35.
- Maimon, N[aftali] Z[vi] (1978). *La kaŝita vivo de Zamenhof. Originalaj Studoj*. Tokio: Japana Esperanto-Instituto.
- Morag, Shelomo (1993). The emergence of Modern Hebrew: Some sociological perspectives. En: Lewis Glinert (red.), *Hebrew in Ashkenaz: A Language in Exile*, pp. 208–221. Nov-Jorko, Oksfordo: Oxford University Press.
- Piron, Claude (1985). "Contribution à l'étude des apports du yiddish à l'espéranto". *Jewish Language Review* **4**, 15–29.
- Rátkai, Árpád (2009). "Lazar Markoviĉ Zamenhof kaj la Zamenhof-falsaĵaro". *Esperantologio / Esperanto Studies* **5**, 61–92.
- de Saussure, Ferdinand (1985). *Cours de linguistique générale*. Parizo: Édition Payot. XVIII + 520 pp.
- Waringhien, G[aston] (1953). "La ideologia dramo de L. L. Zamenhof". *Sennacieca Revuo*, N-o 81, 2–9.
- Zamenhof, L. L. (1991). *Fundamento de Esperanto*. Deko eldono. Pizo: Edistudio.
- Zamenhof, L.-L. (1948a). *Leteroj, Volumo I (1901–1906)*. Presentado kaj komentado de G[aston] Waringhien. Parizo: SAT.
- Zamenhof, L.-L. (1948b). *Leteroj, Volumo II (1907–1914)*. Presentado kaj komentado de G[aston] Waringhien. Parizo: SAT.
- Zamenhof, L. (1972). *Hilelismo. Projekto pri solvo de la hebrea demando*. Enhavas la rusan originalon, Гиллелизмъ. Проектъ рѣшенія еврейскаго вопроса [Gillelism"'. Proekt"rěšenija evrejskago voprosa], kaj tradukon en esperanton de Adolf Holzhaus. Helsinko: Fondumo Esperanto. ISBN 951-9005-24-2.
- Zamenhof, L. (1982). *Provo de gramatiko de novjuda lingvo kaj Alvoko al la juda intelektularo*. Enhavas la rusajn originalojn Опытъ грамматики новоеврейскаго языка [Opyt" grammatiki novoevrejskago jazyka] kaj la alian sen ruslingva titolo. Kun tradukoj en esperanton de J. Kohen-Cedek respektive Adolf Holzhaus. Helsinko: Fondumo Esperanto.
- Zamenhof, L. L. (1983). *Originala verkaro. Antaŭparoloj – Gazetartikoloj – Traktaĵoj – Paroladoj – Leteroj – Poemoj*. Kolektitaj kaj ordigitaj de Joh[annes] Dietterle. Osaka: Oriental-Libro. (Foto-represo de la eldono publikigita de Hirt en Lipsiko en 1929.)
- zamenhof, l. l. (1989). *iom reviziita verkaro de l. l. zamenhof. originalaro 1. unua etapo de esperanto (1878–1895)*. Kioto: ludovikito.

- zamenhof, l. l. (1990). *iom reviziita verkaro de l. l. zamenhof. originalaro 2. ĝis la homaranismo (1896–1906)*. Kioto: ludovikito.
- zamenhof, l. l. (1991). *iom reviziita verkaro de l. l. zamenhof. originalaro 3. destino de ludovika dinastio (1907–1917)*. Kioto: ludovikito.
- Zamenhof, Lazare Louis (1995). *Le Hillélisme. Projet de solution de la question juive [La Hilelismo. Provo solvi la judan demandon]*. Tradukita el la rusa kaj el esperanto kaj kun enkonduko kaj notoj de Pierre Janton. Clermont-Ferrand: Faculté des Lettres et Sciences humaines de l'Université Blaise-Pascal. 132 pp.
- Zamenhof, L.-L. (2006). *Mi estas homo*. Redaktis kaj komentis Aleksander Korĵenkov. Kaliningrado: Sezonoj.

Christer Kiselman estas matematikisto kaj laboris pri partaj diferencialaj ekvacioj, kompleksa analitiko kaj geometrio en pluraj variabloj, kaj analitiko en spacoj kun nefinia dimensio. Nuntempe li ĉefe esploras pri diĝita geometrio kaj diskreta optimumado. Li verkis pri la gramatiko de esperanto kaj pri la frua historio de la lingvo. Li membras en la Akademio de Esperanto ekde 1989.

Paperpoŝta adreso de la aŭtoro: Upsala universitato, Matematika instituto,

Poŝtkesto 480, SE-751 06 Uppsala, Svedujo.

Telefonoj: +46-18-4713216 (oficejen); +46-18-300708 (hejmen); +46-708-870708 (poŝten)

Retpoŝtaj adresoj: kiselman@math.uu.se, christer@kiselman.eu

TTT-ejo: <http://www.math.uu.se/~kiselman/>.

